



CONCORDE

Organe culturel

Trimestriel

Direktoro :

Hubert FEREZ

NICA STELO

Abonprezo : 5 F
Subtenabono : 10 F
Tél. : 84.19.07

Vers une culture, une civilisation supérieures, dans la justice, la paix,
la concorde entre les individus comme entre les peuples.

7, Avenue de Reims
C.C. Postal TOULOUSE 632.15
NICE (Francujo)

NOS GRANDES ENQUETES

DECLARATION FAITE A "CONCORDE" par
André BERGERON

Comment ne pas comprendre que la langue internationale ESPERANTO est un moyen, parmi d'autres, de créer entre les femmes et les hommes de tous les pays des liens qui ne peuvent que servir la paix.

Tout ce qui peut aider à la concorde entre les hommes de bonne volonté doit être encouragé.

La Confédération FORCE OUVRIERE n'a cessé d'affirmer son attachement aux ETATS-UNIS d'EUROPE. Ses militants participent aux instances communautaires. L'absence d'une langue internationale gêne les rapports entre les organisations dont les militants se retrouvent d'une façon désormais permanente.

Puisse donc L'ESPERANTO se développer. Je souhaite que ma voix, s'ajoutant à celle de bien d'autres, y contribue un peu.

André BERGERON

Secrétaire général de la
Confédération "FORCE OUVRIERE"

PARIS, le 10 Avril 1972

L'ESPERANTO, CONCEPTION CARTESIENNE -

En 1629, Descartes, exposait les principes d'une langue internationale : "Prenant une langue où il n'y ait qu'une façon de conjuguer, de décliner et de construire les mots, qu'il n'y ait des défauts ni d'irréguliers et même que l'inflexion des noms et des verbes et la construction des mots se forment par affixes, lesquels affixes soient tous spécifiés dans le dictionnaire, en moins de six heures, on pourra composer en cette langue à l'aide d'un dictionnaire".

En 1887, ZAMENHOF publiait l'ESPERANTO qui repose sur ces mêmes principes; mais il a fallu tout le génie du créateur de cette langue pour construire sur eux un idiome capable d'exprimer la pensée moderne dans toute sa complexité. L'idée de génie de Zamenhof, et qui lui a valu de réussir là où bien d'autres avant lui avaient échoué, est simple, comme toute idée de génie : elle a consisté, au lieu de créer la langue, à l'extraire des langues actuelles, en se bornant à celles des peuples qui sont à la tête de la civilisation, c'est-à-dire aux langues européennes.



- Ah ! Vous parlez l'Espéranto !
- Té ! Je le pense bien ; comme si j'étais du pays même.

On ne peut donc pas dire que l'Espéranto soit, à proprement parler, une langue artificielle : elle existait virtuellement comme ces langues.

L'inventeur n'a fait que choisir dans ces langues ce qu'elles avaient de plus parfait, qu'assembler et coordonner leurs éléments communs : seulement il l'a fait avec une telle connaissance de leurs ressources d'expression, avec un instinct linguistique si sûr, avec un sentiment artistique si profond, qu'il a produit un chef-d'oeuvre dont la séduction et les qualités font l'admiration de tous ceux qui l'étudient avec attention.

ROLLET DE L'ISLE

PROVENCA ESPERANTISTA FEDERACIO - (Martigues 1972) -

PROTOKOLO de la Federacia Kongreso

La 18an kaj la 19 an de marto, MARTIGUES, la Provenca Venecio, estis la 38a Rendevuejo de la Provenca Esperantistaro por la ĉiujara Kongreso.

Blua, sennuba ĉielo, kiu kontrastis kun la pluva, griza kaj vintra de la antaŭaj semajnoj, kaj printempa vetero estis sendubaj garantiantoj de plena sukceso por la aranĝoj de la loka centro "LAGA STELO", kies bonegaj preparoj ebligis facilan kaj rapidan disvolviĝon de ĉiu ero de la programo. Estas notinde, ke la kongresejo "Les Capucins" havis ĉiujn eblojn por kongreso : ĝi perfekte taŭgis de akceptejo ĝis restoracio tra kongressalono kaj honortrinkejo.

Jam sabate posttagmeze grava anaro estis surloke. Por la plimulto temis pri amika renkontiĝo kun planita programo, kies eroj estis : vizito de la Muzeo de Martigues kaj ankaŭ de la "Birdspegulo", provencaj dancoj prezentitaj de la loka folkloro grupo "Li dansaire dou Terraillet", honoraperitivo de la turismoficejo. Por la kandidatoj de la unugradaj ekzamenoj temis pri altraduko, detraduko kaj verko.

La vespera programero antaŭvidis amikan manĝon en restoracio, kien agrabla menuo allogis ĉiujn alvenintojn. La manĝon sekvis balo, kies etoso amika, familia, unuvorte samideana, bedaŭrindigis de ĉiu la rapidan forpason de tiuj agrablaj horoj. La disiĝo okazis malfrue en la nokto.

.....

Frue alvenas la gekongresanoj, kiuj troviĝas ĉirkaŭ centdudek en la debatsalono, kiam je la 9a precize malfermiĝas la 38a Kongreso de la Provenca Regiono sub prezido de nia agema prezidanto GARRIGUE.

Apude de Samideano GARRIGUE sidas ĉe la oficiala tribunon dekstre S-ano LAURET el Port-de-Bouc, S-ano LHERMET prezidanto de "LAGA STELO", maldekstre S-ano SARETTO Federacia Skretario. Plaĉa festparolado de Sro LAURET tuj tradukita en la francan fare de S-ano LHERMET, bonvenigas la partoprenantojn

La alparolo ĵus komenciĝis, kiam alvenas S-ro RIEUBON deputito-urbestro de Port-de-Bouc kaj iom poste S-ro PASCAL magistratano de Martigues.

S-ano LHERMET tiam dankas la lokajn eminentulojn, kiuj per sia ĉeesto honoras la kongreson. Alparolante S-ron PASCAL li dankas la urbestron pro liaj akcepto kaj apogo al nia ĉiujara kunveno.

Tuj poste S-ano LAURET daŭrigas sian alparolon al la ĉeestantaro. Elvokante la profunda kaj fruktodonan laboron de la esperantistoj koncerne tutmondan konkordon, li sin turnas al la gejunuloj, kiuj scios profiti ĉiun okazon por senperaj kontaktoj kun anoj de ĉiuj nacioj. La gejunularo portas en si mem la esperon de estonta sukceso por nia movado.

Post tiu festparolado de S-anoj LAURET-LHERMET, prezidanto GARRIGUE siavice alparolas la gekongresanojn, unue por montri la progresojn inter la du kongresoj en Martigues, de la 26a kun kvardek partoprenintoj ĝis la 38a, la hodiaŭa, kun centdudek alinĝintoj, kaj poste por danki la urbestrojn de Port-de-Bouc kaj Martigues, kiuj per materiaj kaj financaj apogoj alportas al nia loka kaj regiona afero efikan helpon.

Al S-ro RIEUBON li donacas, dankosigne, la verkon pri la vivo de Zamenhof, en franca lingvo "Le Docteur Esperanto".

S-ro RIEUBON danke salutas kaj gratulas la gekongresanojn ĉar "via agado celas abolicion de la lingvaj baroj inter la popoloj; la esperantistoj, la unuaj, subtenas tiun agadon ne nur naciskale sed ankaŭ internacie, tiu via strebado daŭre pliampleksiĝu, mi tute aprobas vian deziron enkonduki Esperanton en la lernejojn kaj mi promesas apogon al via afero kaj ankaŭ tiun de miaj amikoj. Dezirinte plensukceson al la kongreso, S-ro RIEUBON adiaŭas nin ĉar liaj funkcioj devigas lin partopreni alian kunsidon.

Tiam siavice S-ro PASCAL, magistratano de MARTIGUES salutas la kongreson, petas senkulpigon por S-ro LOMBARD, urbestro, kiu ankaŭ detenita de siaj funkcioj venos pli plafrue. S-ro PASCAL diras sian kontenton, ke la federacio elektis Martigues, kiel kongresurbon, ke li akceptas la kongreson nome de la magistrato, kaj ankaŭ ke li partoprenas la debatojn, kiujn li deziras fruktodonaj.

Post la interveno de la urbestroj, prezidanto GARRIGUE dankas S-ron PASCAL nome de la Provenca Federacio, omaĝas al la organizintoj S-anoj LHERMET kaj SIDOBRE kaj ties edzinoj, mencias la grandan ĝojon, kiun ni ĉiuj havas pro nia renkontiĝo, bedaŭras ke la vasteco de nia regiono ne ebligas organizi pluraajn tiajn renkontiĝojn en la jaro.

ĈU vi jam ABONIS aŭ REABONIS al via libera kaj kuruĝa tribuno "CONCORDE"

La prezidanto citas poste la ĉefajn progresojn en Francujo kaj en la mondo. Tria fakultato, PAU, dank'al profesoro SEURIN, havos esperantokurson: dekunu Departementaj Konsikantaroj prezentis al la registrato deziresprimon por oficiala enkonduko de Esperanto en la duagradaĵajn lernejojn (el kiuj Bouches-du-Rhône, dank' al la sindonemo de S-ano BOURDELON).

Interpretistoj pri Esperanto en la lastaj Olimpiaj Ludoj en Sapporo; kursopere de televido dufoje ĉiusemajne en Nederlando; oficiala eksperimento por inserŝanĝo de lernantoj pri Esperanto inter Aŭstrujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavujo; unuafoja instruado de Esperanto egalvalore kun la angla en liceoj kaj teknikaj gimnazioj en Nordrhein-Wesfalen (Germanujo).

S-ano Garrigue montras, ke tiujn progresojn ni ŝuldas al longa kaj senhalta laboro ne nur de kleraj homoj, kiuj kuraĝe frontas tiun gravan problemon sed ankaŭ de ĉiuj, kiuj senfame sed sindoneme laboradas en la urboj kaj vilaĝoj.

Informinte la kongreson pri la forpaso de S-anoj YELLAND (Aspremont) BOURDELON (Marseille) - BERRET (Aix) kaj de Samideano PERRIER (La Seyne), la prezidanto deklaras ke la kongresdebatoj malfermiĝas.

Sinsekve venas ĉe la mikrofono la reprezentantoj de la Federaciaj centroj por raporti pri sia agado: raportas S-ano JULLIEN (Aix) S-ano BLARY (Arles) S-ano MOTTO (Avignon) S-ano ISMARDON (Cannes) S-ano COLNEY (Gap) S-ano GENNARINI (Grasse) S-ano SIDORRE (Martigues) S-ano SARETTO (Marseille) S-ano FROEHLICH (Nice) S-ano AMAT (Toulon) S-ano ESPITALLIER (Vallauris). La raportojn de Carpentras, Hyères, Solliès, Vitrolles legas S-ano SARETTO.

La Federacia sekretario prezentas poste la ĝeneralan agadraporton en kiu li akcentas la necescon de jara kongreso dum kiu ĉiu partoprenanto renovigas sian laborforton por tuta jaro, kuraĝigas ĉiun montrante ke malfacilaĵoj ne estas speciale rezervitaj por Esperantistoj, rimarkigas ke el la du flankoj de la agado la agado PER Esperanto estas profita nur al konvinkitoj sed pli/...

sukcesa ol la agado POR Esperanto ĉar pli allogas homojn festo ol kurso, distro ol laboro.

Post la agadraporto S-anino Denise JURQUET prezentas la finanĉan raporton. La membraro estas stabila kaj la kaso estas sana. La kongreso unuanime aprobas ambaŭ raportojn.

Laŭ la tagordo, venas la momento diskuti la proponojn de la centroj en Aix, Avignon, Cannes, Gap, Martigues; unuopuloj faris proponojn: S-anino BONNAFOUX el Carpentras kaj S-ano DUBUISSON, respondeculo de la Marsejla Centro de Mondcivitanoj. La decidojn de la kongreso oni trovas aldone al la protokolo. Nun, kie okazos venontjare la federacia kongreso? Respondo: S-ro BIDOIT invitas la kongresanojn esti multnombraj en DIGNE por la 39a Provenca Kongreso.----
Decidinte pri la kongresurbo 1973, la kongreso elektas la novam komitaton, kiu estas jene formita:

PREZIDANTO: GARRIGUE François, el Marseille.

Vic-Prezidantoj: Hubert FEREZ, el Nice - JULIEN Marcel, el Aix.

Sekretario: SARETTO Paul, el Marseille

Kasistino: JURQUET Denise (S-ino) el Marseille

Membroj: AMAT Lucien, el Toulon - BONNIOT Léon, el Cannes - BOURDELON Honoré el Marseille - CAVELAN Pierre, el Nice - COLNEY Roger, el Gap - HUMM Simone (S-ino), el Avignon - ISNARDON René, el Cannes - JURQUET Camille el Toulon, - LHERMET Guy, el Martigues - PAZZINI Norbert, el Nice -

Kaj komisiis Prezidanton GARRIGUE por reprezenti la Provencan Federacion ĉe la ĝenerala konsilio de U.F.E. en Nantes okaze de la 64a Nacia Kongreso dum Pasko-1972, laŭ la jena unuanima decido de la kongreso:

La Provenca Federacio kunigita en Kongreso la 19-an de marto en Martigues konsideras, ke la rimarkoj II paĝo 8 N° 270 de Franca Esperantisto pro ĝiaj nekomprenblaj minacoj estas nek elegantaj nek demokrataj kaj averte voĉdonas sindetenon por la agadraporto kaj por la finanĉa raporto.

Sed, ĉar ĝi konsideras, ke Domo de Esperanto estas ne nur utila sed ankaŭ efika por la propagando de nia movado. Ĝi konfirmas la gvidlinion de la estraro nur en tiu punkto II. Ĝi konsideras, ke malkresko de la anaro en UFE devenas ne de la manko de klopodoj fare de la federacianoj, kiel estas substrekte sur la paĝo N° 270 de Franca Esperantisto (linioj 32-37) sed de la neintereso de pluraj jaroj jam de tiu revuo Franca Esperantisto.

La lasta punkto de la tagordo rilatas al diversaj demandoj. Respondinte al kelkaj kongresanoj, la prezidanto deklaras, ke la kongresdebatoj finiĝis kaj donas informojn pri la plua disvolviĝo de la programo. Tiam la kongresanaro ariĝas antaŭ la kongresejo por laŭplaĉa fotado, samtempe "Li dansaire dou Terraillet" prezentas lokajn folklorajn dancojn el kiuj plej ŝatataj estas la marista kaj grenrikolta, kiuj meritas de la junaj artistoj tondran aplaŭdodon. Poste la honoraperitivo de la magistrato ebligas ĝeneralan konversacion laŭ apartaj grupetoj kaj dume, tute apude, ĉe la restoracio ĉio prepariĝas por refortigo de la kongresanaro. Efektive alloga kaj abunda menuo kontentigas ĉiujn. Ĉe la deserto, s-ano GARRIGUE dankas S-ron LOMBARD kaj S-ron PASCAL. La prezidanto donacas dankesigne ankaŭ al S-ro LOMBARD la verkon "Le Docteur Esperanto". Post la respondo de la urbestro venas amuzaj rakontoj el kiuj ni citu tiun de S-ro JULLIEN kaj poemon de F-ino ESPITALIER, kiun, ŝi mem verkis.

Okazis poste la foriro al Saint Blaise, por vizito de la tieaj arkeologiaĵoj kaj muzeo. La arkeologiaj restaĵoj datumas jam de sepcentjaroj. Interesa vizito kun klarigoj de klera specialisto. - Poste reveno al kongresejo por disigo... Entute, sukcesa kongreso, espereble profitdona dum la nova laborjaro, kiu atendas nin..... Ĝis DIGNE por la 39a!

P. SARETTO

(Sekvo paĝon 6)

oooooooooooooooooooooooooooooooooooo

- L'ESPERANTO EN REPUBLIQUE DE CUBA -

LA HAVANE : Le Ministère cubain de l'Education étudie une proposition tendant à enseigner la langue universelle ESPERANTO "dans toutes les écoles et Universités du pays".

Cette initiative gouvernementale est communiquée officiellement à l'Association Universelle d'Esperanto (U.E.A. Rotterdam) ainsi qu'à l'Association britannique d'Esperanto à Londres.

Une Commission est chargée de rassembler une documentation complète sur la question en général, sur les expériences réalisées en d'autres pays aux différents stades des études et sur le rôle de la langue universelle, au regard des besoins des pays en voie d'évolution.

Le Ministère, d'autre part, s'emploie à donner au mouvement espérantiste cubain l'aide indispensable et à préparer un cadre d'enseignants de la langue universelle.

Bien que 31 Pays enseignent l'Esperanto à titre facultatif à certaines catégories d'élèves, la République de Cuba serait le premier Etat à introduire la langue universelle dans toutes les écoles.

Notons à cette occasion que le prochain congrès de SAT (Association mondiale et anationale) aura lieu cette année à KUOPIO (Finlande) et sera suivi d'une excursion à Leningrad. - Pour tous renseignements, écrire à SAT, 67, Avenue Gambetta, 75 - PARIS - 20°, en vous recommandant de ce journal.

NOTRE POINT DE VUE - Le monde dans lequel nous vivons est plus que jamais celui des nations unies par l'esprit de Coopération.

Croire en la Coopération n'est pas rêver béatement en l'universelle embrassade ; c'est croire en la nécessaire convergence des volontés de se comprendre en vue d'abord de coexister avant de travailler ensemble.

"Un monde ou pas de monde du tout" disait, il y a vingt ans, un candidat à la présidence des Etats-Unis. Telle semble bien être l'alternative qui nous est imposée, et tout ce qui tend vers l'unité de notre monde, telle la pratique de l'Esperanto, va dans le bon sens.

PRIPENSOJ CIRKAU KONGRESO - La dimanĉon 12.12.1971, dank' al la gekantistoj, kiuĵ oferdonacis al ni muzikan regalon ; al S-ro PEREZ kaj al la Nica Komitato ; al la suno kaj bona manĝo ; al la multnombraj, el ĉie venintaj gesamideanoj, ni trapasis agrablan kongrestagon. Tamen, opinias mi, ke ni povus, venontfoje - okaze de tiu aŭ alia kongreso - agrabligi plie nian kunvenon per detalo.

Bankedo devas estis por la homoj okazo de ripozado, de retroviĝo kun ŝatataj geamikoj, de interkonatiĝo - do devas oferi eblecon je libera babilado... Kompreneble, ĉiu grupo volas - kaj devas - informi nin pri sia agado, sed kial dum la matena kunsido ?

Unue, la ĉeestantaro pli volonte "aŭskultus" : sekve malaperus la streĉa atmosfero kreita per la ĉiama "silentu" ; plie, la grupanoj mem profitus plene sian bankedon, anstataŭ ol batali kun la mikrofono.

Iuj pensos : ni estas multe pli nombraj ĉe la bankedo, ol ĉe la kunsido ! Tio estas normala, homa ; situacio neniel kritikinda respondas mi : la homoj sin turnu al la gazetoj. Ĉu S-ro PEREZ ne ĵus provis, ke la Esperantistaro ilin tralegas ?

Vi ĉiuj pripensu

G.. COULON

PROVENCA ESPERANTISTA FEDERACIO - Sekvo de la paĝo 4a - (vidu paĝon 6an)

Aldono al la protokolo de la kongreso - Propono de S-ano DEBUISSON por ĝeme-
liĝo de Esperanto-Movado kun Mondcivitanoj.

La membroj de la Provenca Federacio de la Kulturaj Centroj de Esperanto, aringintaj en Kongreso en Martigues la 19an de marto 1972, post diskutado de la afero, maltrankvilaj je la penso pri la militoj, ili estu deklaritaj aŭ ne, kiuj nuntempe sangomakulas la mondon, dezirantaj unuigi en samaj penso kaj ideo, la Grandan Bonfarinton de la Homaro, D-ro Zamenhof, iniciatinto de Esperanto kaj la unuan Mondcivitanon Garry Davis, laŭ la propono de Maurice DUBUISSON, Delegito de la Lingva kaj kultura Komitato "CONCORDE", respondulo de la Marsejla Centro de Mondcivitanoj, insiste petas la Esperanto-Movadon kaj la Internacian Centron de Registrado de Mondcivitanoj pere de F-ino Jeanne HASLE, delegitino elektita ĉe la Popolkongreso, ke ili faru la necesajn Klopodojn cele al disvastigo kaj fakta realigo de tiu ideo, ke mondskala interkonsento elektu kandidaton komunan al ĉiuj Esperanto-Organizaĵoj, cele al baloto ĉe la Mondkongreso. -----

Unuanime aprobato !

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

NI KANTU ! (Okase de niaj kunvenoj, de niaj promenadoj, de niaj festoj)
----- - En ĉiu numero de "CONCORDE", ni publikigas kanton -

O SUNO MIA (O SOLE MIO)

I

O ! Bele brilas sur ĉiel'la suno
En la serena blu' post la tempesto
En vento freŝa, pompe kiel festo,
O bele brilas sur ĉiel la suno ...

II

Sed kun l'okuloj, vi estas pli
O suno mia ja estas vi
O, suno, O suno mia
Ja estas vi, ja estas vi

III

La lumo brilas ĉe fenestro via
Kaj de interne jen, kun eleganto
Aŭdigas bele via dolĉa kanto,
La lumo brilas ĉe fenestro via ...

IV

En nokto kiam iras for la suno...
Renkonte venas mi melankolie,
Sub la fenestron kaj atendas tie,
En nokto kiam iris for la suno....

(El la simpatia gazeto "ESPERANTO FERVOJISTO")

L A I N F O R M I L O

de la ORIENT-FRANCA ESPERANTO FEDERACIO

Sidejo : FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE

27, rue de la République - 54 - NANCY 01

Notu bone la adresojn de la respondeculoj por la laborjaro 72/73 :

PREZIDANTO : J.P. COLNOT, 15 rue de Lavaux, 54 - LAXOU

Vic-Prezidanto : (rilatoj inter federacioj) : A. LIENHARDT, 24 Avenue de Riedisheim, - 68 - MULHOUSE.

1-a Sekretario : A. GROSSMANN, Bât. D2, rue de la Doller, 68 - ILLZACH

2-a Sekretariino : F-ino Anna JACQUOT, Vallon St. Antoine, 88 - EPINAL

Kasisto : J. CHAPPELLIER, 109, Avenue de la Malgrange, 54 - JARVILLE -
C.C.P. 399.75 - NANCY.

Raporto pri la 31-a Kongreso de la Orient-Franca Federacio

okazinta en Strasbourg la 26-an de marto 1972

Ĉirkaŭ 60 personoj plenigis la salonon de la hotelo PAX, kie okazis nia

kongreso. Je la 9-a 30 S-ro Cuéné malfermas la kongreson, kaj legas kelkajn salut-leterojn, inter-alie de S-ro Knecht, kiu salutas el Gado, kie li nun deĵoras, aliaj leteroj venis de S-ro Hoegener, je la nomo de la komitato de LUISEMBURGA ESPERANTO-ASOCIO, de S-ro Ferez el Nice, S-ro Rousseau (UFE-Parizo) kaj S-ro Erasmus Zilles el Neustadt/Weinstr.

S-ro Colnot prezentas la agad-raporton de oktobro 1970 ĝis septembro 1971, kiu aperis en la Informilo (Concorde N° 32). Li kompletigas ĝin per ĝisdataj informoj. Jam 80 membroj pagis ĉi-jare sian kotizon, tio estas kontentiga rezulto, se oni komparas ĝin kun antaŭaj jaroj, kiam sam-date nur 30 membroj aliĝis.

Poste estas prezentata la kas-raporto, kiu montras, ke ni enspezis 392 F. dum la pasinta jaro kaj elspezis 324,94 F. Estas do profito de 67.06 F. Ni havis antaŭ unu jaro 728,16 F. en la kaso, kaj nun estas 795,22 F. Krome ni ricevis kaj repagis al S-ro Ferez preskaŭ 80 abonojn al CONCORDE je 5 F.

Ambaŭ raportoj estas unuanime akceptitaj.

Poste venas raportoj de kelkaj aktivuloj pri la agado en sia urbo : S-ro Zipfel amplekse raportas pri la Strasburga grupo, S-ro Lienhardt pri Mulhouse, S-ro Bergerot, pri Epinal, S-ro Manceau pri provo en Metz, S-ro Colnot pri Nancy.

Kiel jam estis pri-diskutata dum la lastjara kongreso, ekestis ĉiam pli da malfacilaĵoj por eldoni la "Informilon". Tiam estis decidite, ke la kotizo por 1972 estu je 3 F. Intertempe la situacio ŝanĝiĝis, kaj la komitato akceptis (per 8 jesoj kaj 2 sindetenoj), ke nia "Informilo" aperu sur 2 aŭ 3 paĝoj en "Concorde" kontraŭ abono de ĉiuj niaj membroj je 5 F. La kongreso ankaŭ akceptas tion, konsiderante, ke tio ne estas definitiva solvo. Rilabe la numeron 31, ni disponis pri 100 ekzempleroj malavare disponigitaj de S-ro Ferez, kvankam tiam ni transpagis al li nur 47 abonojn. Intertempe alvenis pli ol 30 novaj abonoj. Ni bezonus almenaŭ 40 pliajn abonojn kaj alvokas al ĉiuj pasint-jaraj membroj, por ke ili abonu.

Pri la raportoj de UFE, la kongreso ekzamenas 4 punktojn, al kiuj ĝis devas respondi, ĉu aprobita aŭ ne.

- | | |
|---|-------------------|
| 1-2 Agad-raporto de UFE | unuanime aprobita |
| Pri la financa raporto : | |
| 2-e 1-a parto kontoj 1971 | unuanime aprobita |
| 3-e 2-a parto buĝet-propono 1972 | unuanime aprobita |
| 4-e Ĉu vi konfirmas la gvidlinion de la nuna estraro kaj nome la fonduso "Domo" ? | |

Kelkaj membroj petas klarigojn pri la gvidlinio, kaj ali-flanke oni rimarkigas, ke okazis dum la lasta jaro interŝanĝo de cirkuleroj kaj polemikoj pri du aferoj:

- Paska kultura semajno 1971 organizita de S-ro Llech-Walter
- Eldonado de la broŝuro "Une langue internationale commune à toutes les nations du monde" de S-ro Rougetet.

Fine la kongreso aprobas tiun lastan punkton, bedaŭrante tiujn du aferojn, kiuj malunuigas la Esperantistojn en Francio, kaj samtempe petas klarigojn pri ili.

Plie okazas la voĉdonado por elekto de la UFE-komitatoj.

Estas 10 kandidatoj por 8 postenoj. Tial la voĉdonado okazas per paperetoj, sur kiuj la voĉdonantoj devas skribi nur nomojn. Ni transdonas la nombron de voĉoj al UFE. S-ro Chapellier (aŭ S-ro Galeazzi) estas nia delegito por la nacia kongreso en Nantes.

Poste, la kongreso renovigas trionon de la komitato. S-ro Cuéné, kiu baldaŭ translokiĝos, kaj S-ro Manceau demisias de la komitato. S-ino Hervé ne plu kandidatiĝas. Tial estas reelektitaj f-ino Jacquot, S-roj Chapellier kaj Grossmann. Kaj estas elektitaj novaj komitatanoj : S-roj Barido, Lienhardt kaj Richeateaux, ĉiuj unuanime.

Intertempe alvenis germanaj samideanoj el Oberkirch, Neustadt kaj Radolfzell. Ili estas varme bonvenigataj de la kongreso.

Ĉe la fino de la matena kunsido, S-ro Cuéné adiaŭas al la kongresanoj, dankante al la respondeculoj, kaj tute aparte al S-ro Colnot, pro la gravaj kaj ampleksaj sekretariaj laboroj, kiujn li ĝis nun plenumis ebligante la ekziston de nia federacio.

S-ro Colnot dankas al nia Prezidinto pro la farita laboro, kaj amika kunlaborado dum la pluraj jaroj, kiam li akceptis respondeci pri la gvidado kaj la vivo de nia federacio.

Post la komuna tagmanĝo, la nova komitato kunvenas kaj elektas la novan estraron, kies liston vi trovos antaŭ ĉi-tiu kongres-raporto. La aliaj membroj de la komitato estas : S-ro Joseph Barido (Strasbourg), S-ro Marcel Bergerot (Epinal), S-ro Pol Denis (Bar-le-Duc) ; S-ro Robert Durand (Epinal) ; S-ro Fernand Knecht (Fort-Lamy) ; S-ro Louis Richerateau (Strasbourg) ; S-ro Eugène Wermelinger (Buhl).

Dume aliaj kongresanoj vizitas la alzacan muezon, aŭ la urbon, kaj aliaj rigardas lumbildojn kaj filmojn pri Grezijono kaj Primoŝteno (Jugoslavio).

La venonta federacia kongreso okazos en Nancy.

A. GROSSMANN

Invito al la Hingrie.

Niaj Strasburgaj amikoj denove ĉi-jare okazigos sian jam kutiman renkontiĝon en la Hingrie. Ili varme invitas partopreni ĝin dum Pentokosto, la 21-an de majo. Dezirantoj povos eĉ resti dum tri tagoj, la 20-an, 21-an, kaj 22-an. Ni memorigas al vi, ke la Hingrie troviĝas apud Rombach-le-Franc post Lièpvre. Tie, en feria domo, oni povas tranokti, kaj kuiri manĝaĵojn ; do ne necesas kunporti manĝilojn, sed nur manĝaĵojn.

Estas proponite okazigi komitat-kunvenon (eble subĉielan) la 21-an post tagmeze, se estas sufiĉe da komitatanoj.

Do al ĉiuj ĝis tre baldaŭ en la Hingrie.

Nia Informilo

Kiel vi povis konstati, la viv-ebleco de nia Informilo estis en la lasta periodo tre ŝanceliĝanta. Sed dank'al la klopodoj de s-ro Colnot kaj al la akcepto de S-ro Perez, ĝi nun povas aperi regule en "Concorde" 4-foje jare. Tiel restas al ni ligilo por nia federacio, kies vivon ĝi devos reliefigi. Tial ĝi bezonas ankaŭ vian kunlaboradon ; mi do petas al vi bonvolu sendi al mi tekstojn kaj informojn antaŭ la 10-aj de januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Antaŭ-dankas al vi pro via helpemo.

la 1-a sekretario : A.Grossmann.

Estonta Esperantistino !

Gesinjoroj André kaj Masako Grossmann elkore dankas al vi, pro la sinceraj kaj afablaj gratuloj ricevitaj, dum la kongreso en Strasbourg, pro la naskiĝo de sia filineto Katia, le 24.1.72. Tial S-ro Lienhardt ĝoje sciigis al la kongresanoj pri estonta Esperantistino en la grupo de Mulhouse.

Reĝustigo - Nancy - Koresponda kurso -

Pro eraroj en la teksto aperinta en "Concorde N° 32", bonvolu trovi ĉi-sube la ĝustan tekston :

Finlernis la unua-gradan kurson dum la lern-jaro 1970/1971 :
 S-ro GENAY gvidita de S-ro Fondrillon (ambaŭ en 54 - Essey-les-Nancy) ;
 S-ro BOIVIN (39-Dole) gvidita de S-ro Bergerot (Epinal)
 S-ro DELOISON en 80 Wathiéhurt gvidita de S-ro Zipfel (Strasbourg)
 F-ino CROISE (54- Brin-s-rSeille) gvidita de S-ino Stengel (54 Tomblaine)
 S-ro REDON (57-Flevy) kaj S-ro GROSS (57, Scy Chazelles) gviditaj de
 S-ro Offroy (57 - Chateau Salins).

J.P. COLNOT

EN ESPERANTO - LANDO

AIX-en-PROVENCE - 13 - (Propono farita en la Kongreso). La Grupo, konsiderante ke multaj urboj propagandas en Esperanto pri siaj foiroj, proponas, ke la Federacio kunordigu la agadon de la grupoj pri tiu afero, mendante ĉiujn afiŝojn kaj instigante la grupojn glui tiujn afiŝojn dum la sama semajno, tiel, ke vojaĝanto povu vidi ilin en diversaj lokoj. Ŝajnas al ni, ke tio povus pligrandigi la propagand-efikon. Aprobite.

AVIGNON - 84 - (Propono en la Kongreso). La Federacio starigu, ek de oktobro 72, kalendaron pri la regionaj kunvenoj, kiujn la grupoj intencas organizi, cele al maksimumo de ĉeestantoj. Ni ofte ekscias, pere de la gazetoj, ke kunveno okazis proksime de Avignon kaj ni tiam estis tute ne avertitaj. Necesas informoj de la sekretarioj. Unuanima aprobo.

CANNES - 06 - La centro de Cannes invitas plej bonajn lernantojn de Carpentras unu semajnon en Cannes kaj proponas ke tiaj invitoj plimultiĝu en la Federacio kaj en la Federacioj. Loka, federacia, nacia afero. Unuanima aprobo.

CARPENTRAS - 04 - La Grupo nun nomiĝas "Ventuna Stelo". Estraro elektita la 9an de marto: Prezidanto, S-ro AUBERT; Vic-Prezidantino, F-ino COMITI - Sekretariino F-ino REYNAUD - Bibliotekistino, S-ino DELORME - Kasisto, S-ro REVEST. S-ro AUBERT kaj S-ino DELORME daŭrigos gvidi la kursojn. La Grupanoj multe dankis S-ino BONNAFOUS, kiu donacis 50 F. por la Grupo. Dimanĉon la 12 de marto, familia renkontiĝo kaj tagmanĝo en Restoracio "La Klubo".

CASSIS (Super) - 13 - Ni gratulas nian fame gasteman Samideaninon S-inon Hélène STOFFERS el la feina vilao "Tabou", kiu gajnis la duan premion en la esperantista konkurso de la 18a Australia Kongreso. Ŝi ricevis 80 pakaĵojn el 25 landoj, entute pli ol 400 erojn!

CLERMONT-FERRAND - 63 - Un usage judicieux de l'Espéranto - "L'Abeille Thiernoise" (Société Apicole de Thiers qui fait preuve d'un bel essor) a vu le jour en 1968, à la suite d'une scission au sein de la section thiernoise, en raison des difficultés que rencontraient les adhérents de cette dernière pour acquérir du matériel. Maintenant, grâce à l'activité des espérantistes (MM. Marius Dessapt, de Thiers et Gaston Vidal, de Clermont (présentation de documents, de matériel apicoles, collectés grâce à l'Espéranto, de traductions de lettres d'apiculteurs espérantistes étrangers, la Société connaît une ère prospère. G. VIDAL

CEVENNES - "Les Amis des Jeunes" organizas kamprestadojn por Junuloj kaj plenkreskuloj. Antaŭ kelkaj semajnoj, ni sekvas esperantajn kursojn kaj ni ŝatus ke la membrojn de nia Asocio lernu ĝin dum la ferioj. Ni pensis ke la bona rimedo estas permesi al la Esperantistoj restadi dum la sezono en la regiono de la Cevenoj (Cévennes) kie ni deziras aranĝi centron por internaciaj renkontiĝoj kaj ripozoj. Ni estus tre dankemaj al vi informi viajn konatulojn, kiuj povas interesiĝi pri tiu restado, kiukazos dum julio kaj aŭgusto (ek de la 20a de julio). Ni tendumas. Informiĝu ĉe: Jean Gauthier, 11 rue P. Langevin - 13 - ARLES (Communiqué par S-ino Camille JURQUET, Toulon.)

G A P - 05 - La membroj kunvenintaj la 6an de Februaro 72 proponas, cele vigligi aŭ naski starpunktojn de la movado en diversaj lokoj de la regiono, kie ĝi ne estas enplanta, note en Draguignan, St Raphaël, St Tropez, Brignoles, Salon, La Ciotat, Cavailhon, Manosque, Sisteron, Briançon, K.t.p. sugestas organizi sporade ĉium trian aŭ kvaran jaron en la urbo de la Federacio, kie la movado praktike ne ekzistas, la federacian kongreson, kondiĉe ke:

- 1° - En tiu urbo loĝu almenaŭ unu esperantisto, kiu eventuale povus gvidi kurson kaj krei grupon.
- 2° - La plej najbara grupo donu efektivan apogon kaj helpon por la organizado de la Kongreso.

3° - La Urbestro sin montru favora al nia afero kaj organizado de ties kongreso, note pruntedonante la kongresan ĉambron. Unuanima aprobo.

NOTINDE - Ni sciigu niajn legantojn ke, dank' al la iniciato de nia amiko Roger COLNEY, el Gap, estis, en 1971 rekrea la franca sekcio de la Esperantistaj Poŝtistoj, kium direktis, antaŭ la mondmilito, S-ano FILIATRE kaj kies bulteno nomiĝis "Le Lien des PTT" aldono al nia organo "Concorde". Ties estraro estas nun : Président Honoraire, Mme M. MULLER (Strasbourg) - Président : M.P. CELLIER (St Etienne) - Secrétaire M.R. COLNEY (Gap) - Trésorière Mlle H. DUCHAMPS (Villeneuve /Lot.) Sidejo M.Roger COLNEY - PTT 05 - GAP.

GRENOBLE - 38 - Ni sukcesis voĉdonigi, de la "Departementa Konsilantaro" deziresprimon por aldono de Esperanto al listo de lingvoj, ne devige lernataj, sed ekzamenindaj por akiri la bakalaŭrecon.

Nia Grupo 'K.E.S.O.G.) organizis, fruktodone, la Kongreson de la Federacio "Rodano-Alpoj", kiu okazis la 19an de marto.

Pri niaj kunvenoj : de post lasta septembro, ili regule okazas en ĉambro de la Regiona Centro de Pedagogia Dokumentaro, 11, rue Général Champan, kie troviĝas nia sidejo.

M. GRANIER.

L'ESPERANTO EST LA SYNTHÈSE GÉNIALE DES GRANDES LANGUES DE CULTURE EUROPÉENNE"
"Antoine Meillet, Professeur au Collège de France"

MARTIGUES - 13 - La centro de Martigues "LAGA STELO" proponas, ke la Federacio donu al individua membro membrokarton, kiu permesos pli bonan kunordigon en la diversaj sekcioj .- Unuanima aprobo de la Kongreso.

MENTON - 06 - Une centaine de touristes Ukrainiens, après réception à l'hotel de Ville, ont tenu, avec le même nombre de touristes français, leur Banquet à l'Hôtel de Paris et le grand quotidien "NICE-MATIN" qui relate cette cérémonie, ajoute : "On a échangé des idées en toutes les langues : l'anglais, l'allemand, l'espagnol, l'Esperanto (mais oui !) et les élèves des cours du soir, souvent avec succès, leur russe encore très scolaire."

L. VANNINI

MONACO - (Principauté) - La 7an de Februaro, Generala Kunveno en Hotelo Splendid Ĝekvis bankedo ĉe kies deserto, S-ro Froehlich generala Sekretario de la Nica Grupo legis amikecan salutesprimon de Prezidanto Férez, kiu ne povis ĉeesti pro malbona sanstato. Dum frandema gustumado de ĉampano oferta de S-ano DERKS, nia ŝatata kantstelulino S-ino Irène KLEIN regalas kiel kutime, la ĉeestantaron per sia ĉamplena repertuaro. Nia Samideano LAMACCIA emociigis nin per la italia kanzono "Sankta Lucia".

F. FROEHLICH

ROMANS - 26 - Regiona Renkontiĝo - Tiu finsemajna renkontiĝo okazis la 26an - 27an de februaro. Malfermo okazis sabaton je la 15a en la sidejo de la Grupo, 31 Strato Pêcherie "Bona Stelo" invitis ĉiujn esperantistojn partopreni tiun renkonton kies celoj estis : pli bona interkonatiĝo de la Federacianoj kaj de la samideanoj el la proksimaj Federacioj - partoprenigi la novajn esperantistojn ekde la unuaj studmonatoj al esperantista manifestacio - montri al tiuj novuloj la eblecojn de la esperantista movado - tutsimple ebligi al ĉiuj esperantistoj paroli kaj amuziĝi en Esperantujo.

Proksimume 40 personoj partoprenis tiun aranĝon. Inter ili estis esperantistoj el St Etienne, La Ricamarie, Lyon, Vienne, Privas, Crest, Nyons, Carpentras kaj Avignon. La etoso estis tre simpatia. Post Babilado oni aŭdis sonbendojn kaj vidis filmojn el la servo de UEA. Bonvoluloj prezentis filmojn kaj diapozitivojn, kiujn ili faris dum vojaĝoj eksterlanden.- Dinanĉe matene tre interesa prezentado de aŭdvida kurso. Poste, tagmanĝo en la junuldomo kun 35 parto prenantoj. Posttagmeze, vizito de la antikva preĝejo Sta Barnard apud kiu, antaŭ ĉirkaŭ 10 jarcentoj, grupiĝis kelkaj domaĉoj : tiel naskiĝis la urbo Romans.

Fine, vizito de tre interesa muzeo pri ŝuoj kaj pri delfinajkostumoj.

Cirkaŭ la 16a, disiĝo post tre agrabla Renkontiĝo - Maurice DUPUY.

SOUVIGNY - 03 - Sukceso je la eksamenoj de 5 lernantoj de la dua kurso. 10 ĝelernantoj atingis jam la 19an lecionon de la kurso "Concorde". 20 aliaj ĝelernantoj ekstudas la kurson (po 2 lecionoj semajne). Ni partoprenis la nacian kongreson en Nantes. La 14an de majo, ni ĉeestos la regionan kongreson en Vichy.
Aimée ROSE.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

FEDERATION DEPARTEMENTALE DU GARD. - Al esperantistoj kaj simpatiantoj : Ni invitas vin partopreni interdepartementan renkonton ĉe "Fontaine de Vaucluse", Dimanĉon la 4an de Junio.

Kolektiĝo : Auberge de la Jeunesse, chemin de la Vignasse, Fontaine de Vaucluse, kie okazos komuna manĝo. Prezo : 9 f. Ĉar la junulgastejo povas akcepti nur 40 gastojn, bonvolu do sendi vian enskribon por la 15a de Majo al RAYNAUD, 4, rue Chatard, 30 - ARLES.

Eblos pikniki ĉe la ombro por kiuj deziras kunporti sian manĝon.

Posttagmeze : Vizito de la fama Fonto.

P.S.- Kiuĵ trapasos l'Îsle-sur-Sorgue, estas invitataj saluti la ĝesamideanojn de la grupo J.E.A.N., kiuĵ kunvenos en la urbodomo (10 h. $\frac{1}{2}$)

Venu do pasigi agrablan tagon en esperantista etoso !

La prezidanto : R. RAYNAUD.

DONS pour que prospèrent "CONCORDE" et l'esprit qui l'anime !

P.C. NICE : 5 Frs. - R.F. NICE : 100 Frs. G. GOUDIN : 100 Frs. GROUPE ESPERANTISTE DE NICE : 100 Frs.----- M e r c i !

NACIA KONGRESO DE U.F.E.

En Nantes, regiona, okcidenta metropolo, industria, universitata kaj arta centro, okazis la 64a nacia kongreso de Esperanto, de la 31a de marto ĝis la 4a de aprilo.

La Grupo de Esperantistaj Edukistoj (GEE) kunvenis vendrede - S-ro LE MAGA-DURE estas ĝis nuna Prezidanto.

La teknika liceo Livet taŭgis por la bona organizo de tiu kongreso. Dum la inaŭguro, S-ro Babin bonvenigas la kongresanojn. Doktoro Albault respondas en la ĉeesto de la reprezentanto de la urbestro, kiu restis dum la tuta kunveno. Re-prezentantoj de 5 nacioj, de G.E.E. kaj de Akademio de Esperanto siavice salutis. D-ro Albault, en sia klera kaj klara festparolado, substrekas unue la viziton de D-ro Franz Jonas, Prezidanto de la aŭstria Respubliko, tre konata esperantisto. Li elmontras la ambicion voli ke franca lingvo estu oficiala lingvo por la internaciaj kontaktoj, ĉar ĝis nun ĝi estas nur la 11a pro la nombro de praktikantoj, laŭ la mondkonata lingvisto Mario Pei.

La nanta urbestro akceptas nin en la salono de la urbodomo ; En sia parolo, li rememorigas al ni, ke Jules Verne, naskiĝinta en Nantes, estis honora prezidanto de la esperantista grupo en Amiens....

La miskomprenoj inter la estraro kaj la Federaciestroj, dum pasinta jaro, estis praktikataj. La diskutoj kaj la konkludoj ne kontentigis ĉiun !

Feliĉe la distra parto, malgraŭ malagrabra vetero, sukcesis. Ni longe aplaudis la bretonan folkloran grupon, kiu prezentis al ni ĉielarkon de regionaj dancoj, je la sonoro de sakfluto kaj de "bandardo". La junaj ĝesperantistoj Gonin, 3 Grekoj, kvaropo Babin (frato kaj fratino) kontribuis al la sukceso de tiu arta vespero.

Juna ĝvidantino konigis al ni la malnovan urbon, la kastelon de bretonaj Dukoj la belajn ĝardenojn, kie abunde floras kamelio kaj tuliparbo.

Ni vizitis ankaŭ la Croisic, Guérande kie ĉiu povis laŭ sia plaĉo admirati la kanonikan preĝejon kaj la urbomuregon. La taga ekskurso promenigis la kongresanojn tra Loire Valo, kun vizito de kasteloj Serrant kaj Goulaine, kun vina gustumado de Muskadet

La loka gazetaro substrekis plurfoje favore nian kongreson. Ni devas gratuli la grupon en Nantes, ĉefe la famil. jn Babin kaj Prevot.

La nuna estraro de UFE konsistas el D-ro Albault, Gesinjoroj Vincent Bourdeaux, Rousseau, Saurian-Rousseau kaj Royer. Ni esperu ke tiu nova taĉmento donos al nia franca movado novan impeton.

Venontjare, la 65a kongreso okazos en Luksemburgo, en la kadro de kvinnacia renkonto. Do, ĝis Luksemburgo

François GARRIGUE

LASTHORE

Invito al Kongreso de la Federacia FRANCA CENTRA MONTARO, kiu okazos la 14 an de Majo 1972-a en Vichy (Allier).

Ek de la 8-a, akcepto de la Kongresanoj en salono "Valery-Larbaud", strato Foch, 03 - Vichy.- De la 9h.30 ĝis 11h.30, laborkunsidoj.- 12 h.15 Honorvino en la urbodomo.- 15 h.. Varietea programo.

Por pluaj informoj, skribi al : S-ro R. BLANC, Prezidanto de la Federacio, 9, rue des Seignes en 18.- SANCOINS.

POUR L'ETUDE DE L'ESPERANTO

- 1.- Etude complète en 22 leçons
- 2.- Aucun livre à acheter : le matériel d'étude est fourni.
- 3.- Réception gratuite du périodique culturel "CONCORDE"
- 4.- Invitation personnelle à nos fêtes, rencontres, congrès, etc....
- 5.- Attribution gratuite de correspondants(es) à l'étranger.
- 6.- Attribution d'un diplôme de Fin d'Etudes.
- 7.- Enseignement et correction des devoirs : GRATUITS. Seuls frais : contribution unique de 20 frs (pour frais d'impression des cours, édition de Concorde, invitations, etc...) à verser au Président du Comité Linguistique "CONCORDE" : H. FERREZ, 7, Avenue de Reims, 06 - NICE C.C.P. 632.15 - TOULOUSE

PROKRASSTO - Pro abundego de artikoloj kaj raporto pri kongresoj, ni devas prokrasti ĝis venonta N° (N° 34) la tre interesajn artikolojn de S-ino B. GRAMPP - S-ro VANNINI - S-ro LLECH-WALTER - F-ino Renée TRIOLLE - S-ro CLAIR - S-ro CERISIER - S-ro PELLETIER - S-ro VIDAL S-ro GENNARINI - D-ro SPINDLER.

FUNEBRO

Ni havas la doloron sciigi pri la forpaso de S-ino MALLET, el NICE, de S-ino SANGALLI, el NICE kaj de S-ro BUTTET unu el la plej malnovaj esperantistoj el Svislando.
Ni, afliktite, kondolencas iliajn familiojn.

Dans ce Cadre :
Votre adresse ou celle du
GROUPE LOCAL